


La tri kaproj



Rakontisto:

Jen rakonto pri tri kapro-fratoj: Kapro, Kapreto kaj Kaprego. Kapro havis barbon kaj hufojn. Kapreto havis mallongan barbeton kaj malgrandajn hufetojn. Kaprego havis longan barbegon kaj tre grandajn hufegojn.

Dum jaroj la kaproj loĝis en unu kampeto, kaj finfine ili formanĝis ĉiujn herbojn. Ili estis malsataj. Alia kampo havis verdan herbon, sed ĝi estis trans ponto... kaj ho, ve! Sub la ponto loĝis terura trolo! La trolo manĝis ĉiujn, kiuj transiris la ponton.

Kapreto: “Mi timegas la teruran trolon,” diris Kapreto. “Mi restos ĉi tie, kie ne estas danĝero. Mi manĝos lad-skatolojn kaj ĉifonojn.”

Kaprego: “Nu, nu, frateto – kuraĝon!” milde diris Kaprego. “Ne timu. Ni trompos la trolaĉon, kaj poste ni manĝos la bongustajn herbojn de la alia kampo. Jen mia ideo...”

Rakontisto: Kiam liaj du fratoj aŭskultis la ideon, ili ridetis. Eĉ Kapreto minace skuis la barbeton. Ili tuj decidis iri trans la ponto.

Do, unue marŝis sur la ponton Kapreto. *Klakete, klakete, klakete.*

Trolo: “Kiu marŝas sur mia ponto?” kriegis la malbela, veruka trolo per terura voĉo.

Kapreto: “Nur mi,” respondis Kapreto per malgranda voĉo. “Nur mi – Kapreto!”

Trolo: “Ho, mi manĝos vin, Kapreto!” minacis la trolo.

Kapreto: “Ne, ne, sinjoro trolo. Vi ne volas manĝi min.” diris Kapreto. “Mi estas tro malgranda. Malgrandega! Mia pli granda frato baldaŭ venos. Eble lin vi volos manĝi.”

Trolo: “Nu...” diris la trolo, kaj li pensis momente. “Eble tiam mi havos pli grandan manĝon,” li grumblis. “Foriru!” Do Kapreto klakete kuris trans la ponto al la alia kampo.

Rakontisto: Due marŝis sur la ponton Kapro. *Klake, klake, klake.*

Trolo: “Kiu marŝas sur mia ponto?” kriegis la malbela, veruka trolo per terura voĉo.

Kapro: “Nur mi,” respondis Kapro per mez-granda voĉo. “Nur mi – Kapro!”

Trolo: “Ho, mi manĝos vin, Kapro!” minacis la trolo.

Kapro: “Ne, ne, sinjoro trolo. Vi ne volas manĝi min. Mi ne estas tre granda. Mia pli granda frato baldaŭ venos. Li estas ege granda. Grandega! Eble lin vi volos manĝi.”

Trolo: “Nu...” diris la trolo, kaj li pensis momente. “Eble mi havos pli grandan manĝon,” li grumblis. “Iru for!” Do Kapro klake kuris trans la ponto al la alia kampo.

Rakontisto: Finfine marŝis sur la ponton Kaprego. *KLAKEGE, KLAKEGE, KLAKEGE.*

Trolo: “Ho ve – kia bruo!” kriegis la malbela, veruka trolo. “Kiu marŝas sur mia ponto?!”

Kaprego: “Nur mi,” respondis Kaprego per grandega voĉo. “Nur mi – KAPREGO!”

Trolo: “Ho! Mi manĝos vin, Kaprego!” minacis la trolo.

Kaprego: “Ne, ne, sinjoro trolo. Min vi ne povas manĝi. Mi estas tro grandega!” Kaj tiam Kaprego korn-batis la trolon en la akvon!

Rakontisto: Neniam plu oni vidis la trolon. Kaj eĉ hodiaŭ, la tri kaproj ankoraŭ manĝas la verdan herbon de la kampo trans la ponto.

akv/o water	gust/o taste	per with, by means of
-aĉ awful, lousy	herb/o grass	pli more
al to	hodiaŭ today	pli granda bigger
ali/a other	ho! oh!	plu more, further
ating/i to reach	huf/o hoof	pont/o bridge
ankoraŭ still	ide/o idea	post after, later
aŭskult/i listen, hear	ir/i to go	pov/i to be able, can
baldaŭ soon	jar/o year	respond/i to reply, answer
barb/o beard	kamp/o field	rakont/o story
bat/i to hit, strike	kapr/o goat	rest/i to stay
bru/o noise, racket	kiam when	rid/i to laugh; rideti smile
ĉifon/o rag, scrap	klak/i to “clack”	sat/a full; malsata hungry
ĉiu each (one/person)	korn/o (animal) horn	sen without
ĉiuj all, everyone	kri/i to cry, shout	skatol/o box, can
danĝer/o danger	kuraĝ/a brave	sku/i to shake
decid/i to decide	kur/i to run	terur/a terrible
dev/i must, duty	lad/o tin, sheet metal	tiam then, at that time
dir/i to say	loĝ/i to reside, “live”	tim/i to fear
do so, thus	marŝ/i to walk, march	trans across
dum during, while	mez/o middle	tre very
eb- possible, maybe	mild/a mild, gentle	tro too (much)
eĉ even	minac/i to threaten	trol/o troll
fin/i to finish	moment/o a moment	tromp/i to fool, trick
fine at the end	loĝ/i to live in, reside	tuj immediately
finfine finally	neniam never	ve woe; ho ve! Oh, no!
for away, gone	nu “well”, “now” (intj.)	ven/i to come, approach
foriri to go away	nur only, just	verd/a green
formanĝi to “eat up”	oni one, “they”	veruk/o wart
grumbl/i to grumble	pens/i to think	vol/i to want